

Esperanto kaj UN

Informilo de la oficejo de UEA por rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj

Numero 70, majo-junio 2024



Universala Esperanto-Asocio

Universala Esperanto-Asocio emfazas lingvajn rajtojn en sia mesaĝo okaze de la Internacia Tago de Familioj, la 15-a de majo 2024

Okaze de la ĉi-jara UN-Tago de Familioj, UEA publikigis la jenan mesaĝon:

Ĉar homoj unuiĝas en familioj, je pluraj formoj, esencas, ke ni pripensu la problemojn kaj bezonojn de familioj por vere konstrui mondon de rajtoj kaj evoluigo por ĉiuj. Ekde rajtoj de infanoj, virinoj kaj pliaĝuloj, ĝis laboraj kondiĉoj kaj protekto de naturmedioj, familioj ludas gravan rolon kiel antaŭenigantoj de pozitivaj ŝanĝoj.

Ĉar familioj konsistigas la fundamenton de socio kaj provizas ekonomie kaj emocie la venontan generacion, famili-celaj politikoj necesas, precipe por la plej vundeblaj. Politikoj devas rekoni familian strukturon kaj aliajn trajtojn, kaj subteni kaj plibonigi la materialan, interrilatan kaj subjektivan bonfarton de familioj.

En 2024 ni festas tridekan datrevenon de la Internacia Jaro de Familioj. Tiu estas okazo por konsciigi pri efiko sur familioj de ŝanĝoj en teknologio, demografio, urbigo, migrado kaj klimatsanĝoj. Rilate al migrado, ekzemple, en 2018, 1,9 milionoj homoj migris pro familiaj kialoj aŭ kun siaj familianoj.

La 78-a Ĝenerala Asembleo de UN, en rezolucio, alvokas registarojn estigi novajn strategiojn kaj programojn rilate al familiaj bezonoj. Ni kredas, ke tiuj devas inkluzivi lingvajn politikojn. Familioj estas samtempe konservantoj de lingvoj kaj posedantoj de lingvaj homaj rajtoj. Ĉiuj familioj rajtas uzi kaj disvastigi ĉu gepatrajn ĉu elektitajn lingvojn. Individue, infanoj rajtas lerni en lingvoj kiujn ili uzas denaske, ĉiuj rajtas aliri publikajn servojn per lingvoj kiujn ili bone komprenas, kaj pli grave, ĉiuj homoj rajtas partopreni en la ĝenerala publika debato.

Fakte, lingvaj baroj ankaŭ malebligas atingi la Celojn por Daŭripova Evoluigo. Ni bezonas aŭskulti la voĉojn de ĉiuj familioj en ĉiuj lingvoj por garantii aliron al justeco kaj informado, antaŭenigi inkluzivecon kaj partoprenon, kaj lasi nenium malantaŭe.

Universala Esperanto-Asocio, per sia uzo de la Internacia Lingvo Esperanto, celas samtempe garantii tutmondajn lingvajn rajtojn kaj formi lingvan ponton inter lingvoj, popoloj kaj familioj ĉie en la mondo.



Aruŝa: Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo

Tio estas la kongresa temo por la Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio (3-10 aŭgusto 2024). Lingvo estas komunikilo. Ĝi ebligas al ĉiuj esprimi siajn pensojn kaj sentojn ĉu voĉe, signe aŭ grafike. Tiel ni povas transdoni mesaĝon al la esperantista kaj la neesperantista publikoj. Lingvaj diferencoj estis kaj estas je la bazo de pluraj etnaj konfliktoj, kiuj kreas murojn aŭ barojn inter homoj. Tio estas videbla en pluraj konfliktoj, kiuj kaŭzas milionojn da mortoj, vundoj kaj migrado tra la mondo.

Fronte al tiuj problemoj, Esperanto prezentiĝas kiel bona alternativo. La lingvo celas antaŭenigi pacon kaj interkompreniĝon inter homoj. Temas pri lingvo de malkovro, malferm(iĝ)o kaj de proksimigo inter ĉiuj homoj, ĉar ĝi ne ekskludas aliajn lingvojn. Esperanto estas uzata kiel lingvo por kultura kaj socia integriĝo. Danke al ĝi, homoj lernas aliajn lingvojn, kiujn ili neniam malkovrus. Ekzemplas la kazo de la lernado de la evea lingvo (okcident-afrika lingvo, parolata en Togolando, Ganao kaj Benino) kaj la svahila (orient-afrika lingvo parolata de pli ol 200 milionoj da personoj). Tiu ĉi lasta estos instruata dum la kongreso en Aruŝo.

Esperantistoj sentas sin hejme ĉie kaj sekuraj en siaj persona kaj kultura identecoj. Tion ekz. ilustras Pasporta Servo, kiu faciligas la senpagan gastigon de esperantistoj tra la mondo. Esperantistoj kunhavas komunajn valorojn, kiel respekto al la lingva kaj kultura diverseco, la antaŭenigo de la paco kaj la internacia kunlaboro, kaj la engaĝiĝo por daŭripova kaj solidara evoluigo.

Ni alfrontas problemojn de medio, kiel la naturaj katastrofoj, la klimat-ŝanĝiĝo, ŝrumpado de biodiverseco kaj poluado. Tanzanio estas taŭga gastiganto por tiu kongresa temo – la sola afrika lando, kie la loka lingvo svahila estas uzata oficiale en la lernoprogramo kaj en la publikaj instancoj. En la lando altnivelaj esploroj okazas rilate al medio. Tie ni oportune studos la fenomenon de lingvo kaj medio ankaŭ en aliaj mondopartoj. Ni krome analizos la temon el pli vasta, naturscienca vidpunkto: pli bona mondo instigas demandojn pri mediprotektado, biologia agrikulturo, uzo-neuzo de fosiliaj energioj kaj sana medio. Ni analizos kiun rolon ludu la Eo-movado por solvi problemojn aperantajn pro homaj agoj el vidpunkto de lingvo kaj klimat-ŝanĝiĝo.

Reĝisoro de la kongresa temo estas François Hounsounou (Benino). Vicreĝisoroj estas Espoir Kasati (Kongo DR), Cyprien Guiya (Benino) kaj Miora Raveloharinson (Madagaskaro). Ĉiuj estas multjaraj esperantistoj kaj aktivis surloke pri Esperanto, lingvoj, homaj rajtoj kaj naturmedia agado. Por kontakti la reĝisoran teamon pri la kongresa temo skribu al KongresaTemo@groups.io.

UEA bonvenigas strategian raporton de UN pri multlingvismo

Nova raporto kaj gvidilo de Unuiĝintaj Nacioj pri multlingvismo estis publikigita. Temas pri la Strategia Kadro pri Multlingvismo, kiu aperis en marto 2024 kaj estas disponebla en la ses oficialaj lingvoj de UN ([angla](#), [araba](#), [ĉina](#), [franca](#), [hispana](#) kaj [rusa](#)).

La kadro reasertas la engaĝiĝon de UN por multlingvismo per integrado de lingvaj konsideroj en ĉiu labora aspekto de la sekretariato. Krom prezentado de rezultoj de ampleksa esploro pri multlingvismo en la sekretariato, ĝi skizas tri ĉefajn celojn kaj serion de rekomenditaj sekvaj paŝoj. La tri celoj estas: UN kiel vere multlingva organizo; UN kiel efika multlingva laborejo; kaj UN kiel lingve respondeca organizaĵo.

La celoj estas esperigaj kaj invitas nin al kunlaboro. Ili proponas organizaĵon kiu rekonas la gravecon de lingva diverseco tra la mondo, la lingvajn kuntekstojn en kiuj ĝi funkcias kaj la lingvajn fonojn kaj lingvokapablojn de sia personaro. En tiu senco, lingva diverseco estas okazo pli efike solvi problemojn ĉu en tutmonda, ĉu en loka nivelo.

Se lingvo estas la fundamenta bazo por komunikado, kaj tiel, bazo de sociaj, kulturaj kaj ekonomiaj ligoj, ĝi ankaŭ povas esti fonto de diskriminacio. La gvidilo asertas, ke UN devas garantii ke organiza kaj komunika efikeco ne antaŭenigu lingvajn malavantaĝojn kaj antaŭjuĝojn. Tio okazas ekzemple, kiam oni postulas ke lokaj komunumoj adaptiĝu al regantaj laborlingvoj, aŭ ignoras lingvajn fonojn de la personaro.

Kiel komentis Humphrey Tonkin, kunprezidanto de la grupo Esperanto por UN, la publikaĵo ja indikas, ke iom post iom UN rekonas la gravecon de pli inkluziva lingva politiko. UEA argumentas (1) ke oni devas engaĝi kiel eble plej larĝajn tavolojn de la homa socio se oni volas mobilizi tiun socion ĉirkaŭ solvado de mondaj problemoj, kaj (2) la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj klare asertas, ke diskriminacio surbaze de lingvoj parolataj aŭ neparolataj en difinitaj cirkonstancoj estas kondamninda, sed en plej diversaj manieroj oni ja diskriminacias kaj ekskludas pro la lingvoj parolataj de multaj homoj tra la mondo.

UEA-delegitoj survojas al Najrobio

En septembro 2024 Unuiĝintaj Nacioj okazigos la Pintkonferencon de la Estonteco, inter kies esperataj rezultoj estos Pakto por la Estonteco pri la demando kiel trakti la nunajn urĝajn defiojn kiujn la mondo frontas. Bedaŭrinde, la unua malneto de la Pakto por la Estonteco tute ne mencias multlingvecon nek lingvajn rajtojn. Temas pri grava defio, ĉar solvi la krizojn de la mondo postulas inkluzivecon kaj malferman komunikadon, kiuj estas neeblaj dum daŭras lingva diskriminacio.

UEA delonge rolas kiel ĉampiono de lingvaj rajtoj, kaj ni lastatempe strategie okupiĝis pri pledado por atento al lingvaj rajtoj en la procezo kondukanta al la Pakto. Jam de la 1990-aj jaroj la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvoj-Problemoj (CED) kunvenigas de

tempo al tempo sian Nitobe-Simpozion kiu emfazas lingvajn rajtojn kaj ilian gravecon al nuntempaj geopolitiko kaj daŭripovo. Sekve, kaj surbaze de la impeto de la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, la Komitato pri Lingvoj, substanca komitato de NRO-oj (kies prezidanto, Francis M. Hult, estas reprezentanto de UEA al UN), kunvokis dialogan forumon en decembro 2023 por plifortigi al la koncernatoj de UN, ke oni ne forgesu, ke homaj rajtoj inkluzivas lingvajn homajn rajtojn. Tiuj eventoj metis fundamenton por pledi por inkluzivo de lingvaj rajtoj en la Pakton por la Estonteco.

Reprezentantoj de UEA en Novjorko plue aktivis en la formalaj kaj neformalaj mekanismoj por provizi al la Pakto por la Estonteco materialon prilingvan, nome de la civila socio. Tiu laboro inkluzivis prezenton de skribaj rekomendoj pere de la Konferenco de NROj en Konsulta Rilato kun Unuiĝintaj Nacioj (CoNGO) kaj la Ĉefgrupo de NROj, kune kun daŭra konsultado kun membraj ŝtatoj havantaj fortan historion de subtenado de multlingvismo kaj lingvaj rajtoj. La kulmina okazo por inkluzivigo kaj dialogo flanke de la civila socio en la preparo de la Pintkonferenco de la Estonteco estos la UN-Konferenco de Civila Socio okazonta en majo en Najrobio, Kenjo. La Konferenco estos nemalhavebla ŝanco por UEA daŭrigi sian bazan laboron per progresigo de konscio pri lingvaj rajtoj al la koncernatoj de UN ĉe tiu ĉi tutmonda forumo.

Reprezentos UEA en la Konferenco Anny Joalice (Burundo) kaj Mana Brinson (D.R. Kongo).

La venontmonata simpozio pri lingvoj kaj UN pretiĝas

Preparoj nun kompletiĝas por la ĉi-jara Simpozio pri Lingvoj kaj Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazos virtuale la 10-an kaj 11-an de junio. La simpozio, ĉiujara aranĝo kiu kunvenigas UN-stabanojn, lingvoprofesiulojn, edukistojn, fakulojn, diplomatojn kaj anojn de civila socio okazadas regule jam de multaj jaroj. Organizas ĝin komitato kun bazo en Novjorko, kies membroj estas Prof. Francis M. Hult (Profesoro pri Edukado, University of Maryland Baltimore County), D-ro Carol Benson (MLE International), Prof. Lisa McEntee-Atalianis (Profesoro pri Socilingvistiko, Birkbeck University of London), Rosemary Salomone (Profesor pri Juro, St. John's University), kaj Humphrey Tonkin (Emerita Prezidanto, University of Hartford). Detaloj haveblas de: fmhult@umbc.edu. La konferencon aŭspicias la Komitato de Neregistaraj Organizoj de la Konferenco de Organizoj en Konsulta Rilato kun UN (CoNGO).

Oficejo por rilatoj kun UN, Universala Esperanto Asocio, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017. [1] 212-687-7041. www.esperantoporun.org.